

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

55-a jaro - n° 2
Marto - Aprilo - Majo 1963

Demandu provveturon per
la nova

Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj
ĉirkaŭaĵoj

GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

Sonorilo


oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL
BRUNO DENOËL
ISERENTANT ROGER
DE CUYPER GEORGES
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO
DE BRUYNTAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTOJ

JAUMOTTE MAURICE

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK
DRO DENOËL POL, 10 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTINO ŝAKESTRINO POR KONGRESOJ

PLYSON J. 23, PLACO E. FLAGAY, BRUSELO 5 P.K. 236804

VICPREZIDANTO ŝAKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ

VERSTRACHTÉ JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAAN 232, ANTWERPEN TEL. (03) 411912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINO

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 903125

poŝtkonto de B.E.F. : 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

ANTAŬ LA SPEGULO

Antaŭ la spegulo vin mem vi admiras,
kaj la flatajn vortojn al vi diras.
Sed al vi ankaŭ la oldeco venos,
kaj vian ĉarman belecon forprenos.
Via brila harar' iĝos grizblanka,
kaj vangojn kovros kolor' sensanga.
Tiam imagon vian ŝanĝos la spegulo,
kaj via ekstera beleco iĝos nulo.
Senespere vi ploros kaj malbenos.
Via vizaĝo eĉ vin mem ĝenos.
Kaj vi furioze la spegulon disrompos,
ĉar ĝi la venteman koron ĉiam trompos !

AL VIRINO

Virino, ne fieru pri beleco via,
ĉar ĝi ja estas kreaĵo Dia.
Fieru nur pri via propra kreaĵo,
kiun vi kreis per amo kaj saĝo.

ARMAND SU

Armand Su estas juna Ĉina lingvo-instruisto kiu konas multajn lingvojn i.a. la Italian, Francan kaj ankaŭ la Nederlandan ! Li havas nun preskaŭ 26 jarojn kaj komencis lerni esperanton je aĝo de 13 jaroj. Li jam multe tradukis en nia lingvo kaj nun ankaŭ originale verkas. Kiel tia li kunlaboras jam al ĉirkaŭ lo esperanto-revuo. Li ŝatus publikigi ankaŭ en « Sonorilo ». Li portas okcidentan nomon kiun li tre ŝatas ĉar ĝi memorigas lin pri la sentimentala junulo en la novelo de Dumas-filo. Ni publikigas de li originalon, tradukon kaj kelkajn aforismojn.

AM-SOPIRO

Su Cuan (836-910)
Sub la supersŭlitaj abrikotfloroj,
Je la primavera tag' mi promenas.
Jen bela junulo el la famill' nekonata
Survoje al mi renkonten venas.
Kiel volus mi esti la lia
En la tuta vivo kaj por ĉiam !
Eĉ se estos mi de li forlasita,
Mi ne bedaŭros pri mia am' !
El la ĉina trad. Armand Su
(El « 300 poemoj el la Tan-Dinastio »)

AFORISMOI

Kvankam la malklerulo sin elegante vestas,
la vizaĝo jam lian nesclon atestas.
Artistoj konkeras la mondon per la plumo,
komercistoj konkeras la mondon per la monsumo.
Certaĵ volas kaŝi sian veran jaraĝon,
sed per tio ne povas kaŝi la malsaĝon.
Certaĵ virinoj pruvas sian korpan belecon
antaŭ speguloj ;
sed aliaj pruvas sian koran belecon
antaŭ homaj okuloj.

Post la elekto de nova estraro

En la unua numero de nia revuo, — komence de 1962, — S-ro Debrouwere kaj la subskribinto direktis al siaj legantoj, koran bonvenigan vorton.

Kaj en tiu artikolo la du prezidantoj esploris kaj klarigis la diversajn taskojn, kiuj kuŝis antaŭ la administrantaro kaj provizora komuna estraro por la sekvontaj monatoj.

Intertempe plena jaro forpasis. Plena jaro, dum kiu ĉiuj gviantoj havis la okazon ekkoni unu la alian en la daŭra kaj ĉiutaga solvo de problemoj, kiun necesigas la kunigo en unu organismo de du Ligoj, kiuj dum jardekoj iris ambaŭ sian propran, sendependan vojon.

Kaj mi estas certa, ke mi estas la interpretanto de ĉiuj, kiam mi certigas ke tiu kunlaboro iĝis, — ekde la unua momento, — ne nur sincera kaj lojala, sed vere amika. Je neniua momento, ekestis eĉ la plej malgranda malfacilaĵo : La afero de kunfandiĝo de la du revuoj solviĝis glate ; tiu de la unuigo de la delegitecoj en lokoj, kie ambaŭ Ligoj havis delegiton de UEA, estis ankaŭ ĉie kaj surloke solvita.... Kaj nun ĵus, dum la ĝenerala jarkunsido, la 2an de marto, la elekto de la unua definitiva estraro de la Federacio okazis en plej kora atmosfero.

Sur alia paĝo vi trovos la kunmeton de tiu ĉi estraro. Vi ekvidos ke, — konservante al nia Federacio unitarisman karakteron, kiu evidentiĝas per la fakto, ke ni havas nur unu financon respondeculon —, la administrantaro tamen zorgis ke la estraro estu, — ekde la komence, — tiele organizita, ke ĝi povos, estonte, facile adaptiĝi al kiu ajn oficiala situacio, kreita ĉu de la leĝo ĉu per ŝanĝo en la Konstitucia Leĝo.

Krom ĝenerala prezidanto kaj ĝenerala sekretario, kiuj kune respondecas pri la ĝenerala ĉiutaga gvidado de la Federacio, estas, — ekde nun, — ankaŭ prezidanto kaj sekretario en ambaŭ landpartoj, kiuj respondos senpere, eventuale do uzante la nacian lingvon, al ĉiuj interesitoj, eksterstarantoj, ktp. kiuj sin nacilingve direktos al nia Federacio. Tiu aranĝo eble ne simpligas la laboron, sed pliekvilibrigas ĝin kaj permesas al la tri sekretarioj specialiĝi en difinita parto de la laboro.... kaj tiel ĝin pli bone kaj funde pristudi kaj prizorgi.

Je la momento, kiam mi ekfunkcias kiel ĝenerala prezidanto, mi volas alporti plej amikan saluton al mia ĝisnuna kolego S-ro G. Debrouwere, kiu, dum multaj jaroj, estis la prezidanto de Flandra Ligo ; kiu, kun mi, iĝis kunprezidanto de B.E.F. kaj kiu mem proponis, ke mi iĝu prezidanto, dum li kontentiĝus per vicprezidanteco.

En nia belga movado, sindonemaj samideanoj, kiuj havas ankoraŭ la eblecon kaj emon daŭrigi sian kunlaboron, ne retroiras, ne povas retroiri !.... Ili konservas sian funkcion.... Kaj, sekve al propono de S-ro Debrouwere nomi ankaŭ D-ron P. Denoël, pre-

zidanton, estonte do estos triunuo por certigi al nia movado sian plenan neŭtralecon kaj sian plenan efikecon.

Sed por tio, la plena prezidantaro tamen kalkulas, nepre kalkulas, je la daŭrigo de ĉies kunlaboro, senescepte !

Maurice JAUMOTTE.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj – Speguloj –
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

La jubilea Beneluxa kongreso

En la proksima numero, ni verŝajne povos presigi la definitivan programon de nia Jubilea Beneluxa Kongreso. La provizora programo, kiu aperis en la decembra numero, tamen restos grandlinie senŝanĝa.

Ĝis nun cento de kongresanoj enskribiĝis. Bela nombro, se ni pensas ke ili enskribiĝis antaŭ la fino de februaro.... Sed nesufiĉa nombro por esti tiu de la vera kongresanaro.

Ni do, nun, tre forte insistas apud ĉiuj, por ke ili senprokraste ensendu la aliĝilon, kiun ili trovis enpinglitan en la numero de decembro.

Ni memorigas, ke la kotizo estas **Fr. 100** por unua membro de familio kaj **Fr. 75** por dua kaj tria.

La prezoj de aliaj aranĝoj : loĝado, festeno, ekskurso, balono, poŝtkartoj, ktp. estas indikitaj sur la aliĝilo.

Bonvolu ĝin ensendi al la sekretario de la L.K.K. : Sint Bernardse steenweg, 1078, Hoboken kaj ĝiri la monon al la Postĉekkonto N° 44.93.86 de S-ro R. Balleux, Deurne (Antv.)

Tiuj, kiuj perdis sian aliĝilon, povos peti ekzempleron al S-ro J. Verstraeten, sekretario de la L.K.K.

Do : **Tuj ekagu !**

FEDERACIAJ SCIIGOJ

Reelekto de la Administrantaro

La 4an de novembro 1961 kunvenis, unuafoje, la membraro de la du antaŭaj Ligoj, por aprobi la Statuton kaj la Regularon pri Interna Aranĝo de la novstarigita Belga Esperanto-Federacio.

Tiu kunsido ankaŭ elektis la unuan administrantaron de la Societo, kiu siavice decidis ke, — por la jaro 1962 kaj ĝis la proksima ĝenerala kunsido, — la du ĝisnunaj estraroj, kunsidante kune, estos la « Komuna Estraro » de la nova Federacio.

La akceptita Statuto antaŭvidas ke la ĝenerala jarkunsido okazos dum la monato de marto kaj tiel okazis, sabaton la 2an de marto 1963, ĝenerala jarkunsido de la membroj por elekti la novan administrantaron, kiu do siavice elektos la unuan veran estraron de la Federacio.

Estis elektitaj kiel administrantoj-delegitoj de la Grupoj kaj proporcie al ties membro-nombro.

Aalst : F-ino P. de Cock ;

Antverpeno : S-roj M. Jaumotte, L. De Marré, J. Verstraeten, R. Balleux kaj Ivo Durwael, kiu funkcios kiel reprezentanto de TEJO ; kaj S-ro De Schepper, kiu anstataŭos S-ron F. Volders ;

Blankenberge : S-ro G. Couwenberg ;

Bruĝo : S-roj D. De Meulenaere, G. Maertens, Ch. Poupeye kaj F. Roose ;

Bruselo : S-roj R. Jacobs kaj J. Oleffe ;

Charleroi : S-ro R. Paulus ;

Gento : F-ino J. Terry kaj Is. Van Parijs (eventuale koopta) ;

Kortrijk : S-ro G. Debrouwere ;

Lieĝo : D-ro P. Denoël kaj S-ro Lemme ;

Loveno : F-ino M.-Th. Henquinez ;

Verviers : S-ro J. Koeune ;

Wijgmael : Pastro J. De Maeyer.

Estas krome, laŭregulare, administrantoj : S-ro Fr. Schellekens, ĉefdelegito de U.E.A., S-ro R. Iserentant, direktoro de la libro-fako « Sonorilo », kaj S-ro A. Vandeveld, gvidanto korespondaj kursoj.

Kiel kooptaj membroj estis alektitaj : S-ino J. Plyson, F-ino Orsolini ; Grafo G. de Cuyper, S-ro G. De Boes kaj S-ro De Bruyne, kiu funkcios kiel reprezentanto de BEFA.

Estas konsilantoj : D-ro Paul Kempeneers kaj S-ro Henri Sielens.

La nova ĝenerale estraro

Aplaŭde la administrantaro, dum speciala kunsido, elektis la jenan unuan definitivan estraron de B.E.F. :

Ĝenerala Prezidanto : S-ro Maurice Jaumotte

Prezidantoj : S-ro G. Debrouwere kaj D-ro Pol Denoël
 Unua Vicprezidanto : S-ro F. Roose
 Vicprezidantino-fakestrino por Kongresoj : S-ino J. Plyson
 Vicprezidantino-fakestro por teknikaj propagandiloj : S-ro J.

Verstraeten (*)

Ĝenerala Sekretario : S-ro Luc De Marré
 Sekretarioj : Grafo G. de Cuyper kaj S-ro G. Maertens
 Kasistino : F-ino J. Terryn
 Estraranoj : S-ro Ch. Poupeye, kunrespondeculo por la revuo
 S-ro Fr. Schellekens, ĉefdelegito de UEA
 S-ro R. Iserentant, direktoro de la librofako.

La nova ĝenerala prezidanto S-ro M. Jaumotte gratulis individue la membrojn de la nova estraro, pri kies sindona kaj amika kunlaboro li ne nur kalkulas, sed estas tute certa.

Kunveno de la estraro

La nova estraro fiksia la daton de sia unua kunveno : Sabaton, la 27an de aprilo, je la 14,30a h. en « Monico Nord », Bruselo.

La administrantoj estos tuj poste informataj pri la dato de la sekvonta administrantara kunsido.

la jara premio : 500 F

Dum la ĝenerala jarkunsido estis aprokata la Bilanco por 1962, el kiu ŝajnas evidentiĝi, ke la ciferoj ĉi subaj valoros por la kalkulo, proksiman jaron, de la Premio « Antoinette Jennen », kiun gajnos la Grupo, kiu akiras, en 1963, la plej altan procenton, kompare kun sia nuna poentaro (Ni diru, ke ĉiu poento korespondas kun unu franko, pagita al la federacia kasistino :

	membroj	poentoj
« La Verda Stelo », Antverpeno	203	11.295
Esperantista Brusela Grupo	71	4.670
Lieĝo Grupo Esperantista	54	3.640
« Paco kaj Justeco », Bruĝo	50	2.983
Bruĝa Grupo Esperantista	51	2.800
Karloveĝa Grupo Esperantista	32	1.780
Sekcio Gent de B.E.F.	16	1.140
Grupo Esperantista, Verviers	23	1.120
« La Rekta Vojo », Antverpeno	9	615(*)
Genta Grupo Esperantista	7	610
Sekcio Loveno de B.E.F.	6	400
Sekcio Blankenberge de B.E.F.	5	365

(*) S-ro Verstraeten do respondecos kaj respondos pri ĉiuj demandoj rilate al la ekspozicia materialo, al filmoj kun esperantigita teksto; al sonbendoj kun paroladoj kaj kantoj; al diapozitivaj kaj ĝenerale al ĉio kio rilatas al la agrabligo kaj pli interesigo de la grup-kunvenoj.

(*) Tiu ĉi cifero estos, por la komparo, plialtigita, pro la erara sed rekta pago de du aŭ tri membroj al la kaso de la Federacio, anstataŭ de la loka grupo.

Izoluloj (eksterkonkurso)	52	5.375
Abonantoj (revuo)	5	415

La grupaj prezidanto kaj kasisto bonvolu kontroli la ciferon de sia grupo por ke, proksiman jaron, ne okazu diskuto !

NIAJ FINANCOJ

Dum la ĝenerala kunsido de la membroj, ĉiu povis ekscii, ke la unua laborjaro de nia Federacio iĝis iom malprofitdona sur la financa plano.... En aliaj vortoj : **estis deficitito !**

La administrantaro tamen proponis **ne plialtigi por tiu ĉi jaro la kotizojn** por la diversaj kategorioj de membroj. Tiu decido riskas krei novan deficiton por la jaro 1963.

Ŝajnas do ke la administrantaro fidus ke ĉiuj ni klopodos kaj sukcesos varbi novajn, pliajn membrojn por nia Federacio.... Kaj ni firme esperas ke ĉie ĉiuj efektive sukcesos.

Tamen ni scias ke tio ne estas ĉiam facila afero. Tial ni sugestas, ke la diversaj grupestraroj bonvolu ekzameni tiun alian rimedon por havigi ankaŭ pli da enspezoj al la federacia kaso, same cetere kiel al la grupa : Iĝi mem, (se ili ne estas) kaj instigi la « pagipovajn » membrojn iĝi « **bonfara membro** » de BEF, anstataŭ simpla membro, t. e. pagi **Fr. 200** anstataŭ la **125**, kiujn oni pagas en preskaŭ ĉiuj Grupoj.

Sufiĉus verŝajne eta, sed varma alvoko, afable farita de la grupprezidanto por ke IUJ inter la membroj bonvolu iĝi tiaj subtenantoj, ankaŭ sur la loka kaj nacia terenoj.

NIA KAMPANJO EN LA KINEJO

En la antaŭa numero, ni informis niajn membrojn pri la grandskala kampanjo, kiun ni iniciatis en diversaj kinejoj en ambaŭ landpartoj.

Dum la monato de marto, tiu kampanjo startis en kinejoj de :

Gilly	Lier (Rubens)
Seraing (Stuart)	Poperinge (Palace)

Je la momento, kiam ni ensendas tiun ĉi tekston por tiu ĉi ĉi numero, estas ankoraŭ tro frue por diri ĉu tiu iniciativo rikoltis, ekde la komenco, la sukceson, kiun ĉiuj ni esperas.

Ni do diru nur, ke, dum la monato de aprilo, sekvos kvar aliaj kinejoj :

Kortrijk (Filmuniversitato)	Farcienne (Théâtre)
Hasselt (Eden)	Huy (Casino)

Dependos de la sukceso de nia tiuokaza varbado de lernantoj por nia Koresponda Kurso, ĉu ni povos daŭrigi tiun klopodon.

Sed, — kiel ni jam diris en la antaŭa numero, — tiuj membroj, kiuj volas helpi al la daŭrigo de tiu Kampanjo, eĉ nur per

malgranda donaco, povas ĝiri sumetojn al la P.Ĉ.K. N° 16.34.34 de B.E.F., Gento, kun la speciala mencio « **Kineja Kampanjo** ».

EKSPOZICIA MATERIALO

Jam de pluraj jaroj kaj sekve al testamenta donaco de F-ino Henriette Toussaint, « La Verda Stelo » komencis kunmeti kaj nun posedas tre allogan Ekspozician Materialon, kiu jam estas uzita ne nur de la surloka grupo, sed ankaŭ aliloke en Belgujo kaj kies nur-materiala valoro estas pli ol 10.000 frankoj.

Ni jam atentigis pri la fakto ke, dum la lastaj monatoj, tiu ĉi materialo estis plene renovigita kaj la Antverpena E.K.I. uzos ĝin, dum la nuna monato marto, en salono disponigita, dum la semajn-fino 23-24 de marto, de la komunumestraro de Deurne, grava suburbo de nia havenurbo. Kaj ni havos la okazon diri kigrade iĝis sukceso tiu Ekspozicio, kiu estos solene inaŭgurata de la Urbestro mem, kiu estos akompanata de Skabeno.

Multaj el la paneloj estas uzeblaj en ambaŭ landpartoj; kelkaj tamen havas menciojn en nederlanda lingvo. Sed, — tuj post la suprecitita ekspozicia periodo, — kelkaj kuraĝaj membroj de « La Verda Stelo » prizorgos ankaŭ la franclingvan tradukon de tiuj akompanaj tekstoj, tiel ke la Ekspozicia Materialo estos, entute, uzebla, ankaŭ en la franclingva parto de la lando.

Ni do instigas ĉiujn niajn grupojn pristudi la uzon de tiu ĉi gravega materialo, ekzemple por le enkonduko de la nova vintra sezono, t. e. tuj post la libertempo, ekde la komenco de septembro.

Sed ili ne atendu por prepari tian iniciaton kaj por esprimi sian intencon, ĝis kiam diversaj estos eble petintaj por sama momento. Interesitoj sin turnu al nia vicprezidanto-fakestro: S-ro J. Verstraeten, St. Bernadse steenweg, 1078, Hoboken (Antv.)

LITERATURA KONKURSO

La LKK decidis organizi Oratoran Konkurson por la junularo. Ĝi okazos sabaton, la 1an de junio post la 20a h. dum la « kultura parto » de la teatra kaj arta vespero.

Ĉefaj kondiĉoj estas:

- La kandidat(in)oj havu la aĝon malpli ol 25 jaroj.
- La tempodaŭro de ĉiu oratoraĵo estu inter 5 kaj 10 min.
- La temoj estas:
 - a) La junularo kaj la libera tempo,
 - b) Rolo de Unesco kaj U.N.
- La kandidatoj sin anoncu al la adreso de la sekretario: J. Verstraeten, St Bernardsesteenweg, 1078 Hoboken-Belgujo. Limdato: la 31an de majo.
- La laŭreato ricevos premion.

DEBATO PRI ESPERANTO

La 12an de marto, en siaj privataj salonoj de la Hospitalstrato en Bruselo, la « Cercle Constructif de la Vie Sociale » organizis, en la serio de siaj dumonataj kulturaj vesperoj, grandan debaton pri la demando de Universala Lingvo, inter nia ĝenerala prezidanto, S-ro Maur. Jaumotte, kaj S-ro Alfandari, la kreinto de unu plia, kaj tioma, projekto de lingvo: Neo.

Jam antaŭ la komenca horo, la organizintoj devis rifuzi la eniron kaj diversaj bruselaj kaj eĉ lovenaj samideanoj devis aŭskulti... tra duonmalfermita pordo!

Estis S-ro d'Ilmit, prezidanto de la Klubo, kiu bonvenigis ĉiujn kaj prezentis la debaton, unue kaj mallonge en Esperanto, poste en franca lingvo. Por ke la debato estu vere senpartie organizita, li petis ĉeestantinon lotume indiki la unuan parolon: Kaj estis S-ro Alfandari kiu rajtis komenci.

Kvankam li disponis pri duonhoro, en la unua parto, li ne eluzis ĝin kaj mallonge klarigis lian celon: Li estas italo, kiu vivas jam de pluraj jaroj en Belgujo. Sed kiel sudlingvano, li sentis sin iom ŝokita pro la ne-latinidaj vortoj en Esperanto kaj pro ties iom raŭkaj kaj por liaj oreloj malplaĉaj sonoj... Tiun impreson li havis speciale kiam li legis kaj mem volis verki poeziaĵojn... Tial li, kvazaŭ ludante, komencis « korekti » la vortaron, ĝis kiam li akiris lingvon pli latinidan kaj pro tio, por li, pli belsina... Tiu « ludo » iĝis baldaŭ obsedo... kaj



S-ro Alfandari kaj S-ro Jaumotte, debatintoj.

finfine li verkis tutnovan lingvon, en kiu li ja konservis la pre-kaj sufiksojn, sed ilin uzadis ne same regule kiel en Esperanto... Tio signifas, ke li kreis multajn « neo-logismojn » iom similajn al tiuj, kiujn kelkaj niaj aŭtoroj ankaŭ klopodas enkonduki en nian lingvon.

Li ankaŭ alprenis principon de plimallongigo de la vortoj, per kripligo de la radikoj, kiujn — kiel S-ro Jaumotte poste substrekis —, oni plej ofte ne plu rekonas; eĉ kiam ili estas vere latinidevenaj!

Kaj li konkludis promesante respondi al demandoj.

S-ro M. Jaumotte komencis per deklaro ke li ja deziras eluzi sian tempon, ĉar li havas multon dirotan; unue jam pri la temo « beleco ». Li rimarkigas ke, se oni ja povas organizi konkurson por la elekto de la plej bela virino en la mondo, laŭ difinitaj normoj kaj mezuroj, en la vivo tamen la plej bela virino estas tiu, kiun oni enbrakigas; kiun oni amegas... Kaj same estas por la lingvoj. Se iuj povas pretendi, ke la ita-

la lingvo estas la plej bela por kantado; alia eble por bablado, restas tamen fakto ke, ĉe l'komparo kun aliaj lingvoj, ĉiu estas daŭre influita per tiu beleco, kiu estas propra al lia gepatra lingvo.... Kaj tiel okazis cetero al S-ro Alfandari.

Sed, se tiu ĉi havas ja la rajton havi propran opinion pri la beleco de iuj vortoj en Esperanto, li tamen tute malpravus, kiam li kreis lingvo-projekton en kiu li volas altrudi tiun senton de beleco de sud-ulo al tiuj, kiuj deziras uzi internacian, universalan lingvon!

S-ro Jaumotte tiam detale demonstraciis, kiel S-ro Alfandari igis sian lingvon vere malfacile lernebla, pro la grava kripligo de multaj radikoj; ĝis tia grado ke multaj estas ankoraŭ malfacile rekoneblaj ĉe l'parolo. Kiel ekzemplojn li citis: i=havi; si=esti; fi=fari; pi=povi; li=lasi; ka=kvalito; prif=preferi; izo=facila (angla: easy); dufa=malfacila; fed=federacio; udi=aŭdi; uder=aŭskulti.

Finfine, pri la fundo de la problemo, S-ro Jaumotte akcentis, ke NEO estas nur unu inter la eble ducent klopodoj, faritaj de dekoj kaj dekoj da iamaj esperantistoj, kiuj, ĉiu laŭvice, volis plibeligi aŭ plibonigi la verkon de Zamenhof.... Laŭ la konstatita ritmo, ni fakte povas esti certaj, ke, -ekde la aperigo de NEO antaŭ du aŭ tri jaroj, -jam certe, ie en la mondo, ek estis unu aŭ du pliaj projektoj, pli novaj jam ol Neo!

Kvankam la Esperantistoj absolute ne konsideras la Fundamenton kiel iun religian biblion, ili do tamen ne povas eĉ pensi pri «ronda tablo» kun

tiuj, kiuj kreis aŭ defendas tiujn multajn projektojn. Eĉ se ĉiuj nunaj interesuloj akordiĝus pri eventualaj ŝanĝoj farotaj, morgaŭ ekestus alia, nova profeto.... Kaj ĉio estus refarota!

Ne ekzistas cetero diversaj internaciaj lingvoj: Estas nur UNU, kiu vivas; kiu havas, movadon; kiu havas popolon disemitan tra la tuta mondo, kaj kiu estas tiel organizita, ke ĉiuj, kiuj ĝin uzas, jam nun, trovas en ĝia apliko ĉion utilan kaj agrablan. La aliaj estas nur projektoj, kiuj ĉiuj, ĝis nun, restis senvivaj!

Post paŭzeto por la kaftrinkado, S-ro d'Ilmit, dankinte la du oratorojn, ankaŭ ekvokis la eblan dezirindecon de interkonsento inter ĉiuj luktantoj sur la kampo de internacia lingvo.

Tio igis S-ron Jaumotte repeti la parolvicon tuj, por konстати ke fakte la debato ne plu evoluis inter du personoj, sed inter tri, kiuj antaŭmetas ideojn pri la vojo sekvota kaj la solvo akirota. Kaj, en vere entuziasmiga konkludo, S-ro Jaumotte refoje klarigis la kialojn kial, — ekster ĉiu dogmatismo, ekster ĉiu fanatikeco —, la esperantistoj neniam rajtos akcepti tiajn preparolojn pri eventualaj ŝanĝoj.... Nur tiam tio povos okazi kiam rekonita politika povo, UNO, UNESKO aŭ koncentriĝo de minumume okdek naciaj registaroj, estos aprobinta la principon de internacia lingvo kaj estos elektinta Esperanton, kun aŭ sen ŝanĝoj.

Sed, — en tia okazo, — ne plu gravos por la Esperantistoj, **kia** estos la solvo. Ĉiuj tiam feliĉiĝos pro la fakto ke solvo es-

tos trovita!

Lasta vorto estis tiam dirita de S-ro Alfandari, kiu konkludis dirante. « Mi akordiĝas por 95 procentoj kun S-ro Jaumotte. Mi invitas vin do: lernu Esperanto.... Kaj kiam vi konos Esperanton, tiam, se interesas vin la problemo pli detale, ekprenu libron pri Neo.... kaj komparu!

Post tiu kaj tia konkludo,

S-ro Jaumotte rezignis ankoraŭ ion aldoni.

Inter la diversaj paroladoj, S-roj Alfandari kaj Jaumotte havis okazon respondi al demandoj kaj rimarkoj, faritaj de ĉeestantoj.

Estis ja vigla debato, pri kiu ĉiuj ĉeestintoj estas vere kontentaj. Tion ili pruvis per siaj longaj aplaŭdoj.

S.

1963 — Jaro de la Junularo

En la januara numero de la revuo « Esperanto » estas anoncote ke 1963 estos en la Esperanto-movado la **Jaro de la Junularo**, kaj ke UEA kaj speciale TEJO kaj ties sekcioj faros dum 1963 apartajn klopodojn plivastigi sian agadon inter la junularo per pli intensa varbado, informado kaj — en landoj kie ne ekzistas sekcioj — starigo de novaj TEJO-sekcioj.

Inter la plej gravaj projektoj de la Jaro de la Junularo estas la starigo de **junularo gazeto**, kiu estu samtempe la oficiala organo de TEJO, internacia kunligilo inter la junaj geesperantistoj, kaj verva kaj interesa revuo por la tuta Esperantista junularo.

Ni kompreneble celas ke la gazeto estu finance sendependa kaj subtenu sin mem pere de siaj kotizoj. Tamen, TEJO bezonas bazan financon rezervon por la aperigo de provnumero kaj la varbado de abonantoj.

Tiucele UEA starigis la **Fondaĵon Junulara Gezeto**, kiu funkcias kiel aparta kaso de UEA je la dispono de TEJO.

Ni do alvokas al ĉiuj Esperantaj gazetoj ne nur grandskale doni sian apogon al la Jaro de la Junularo, per aperigo de artikoloj kaj informoj pri ĝi, artikoloj de gejunuloj ktp., sed tute speciale vaste anonci la starigon de la **Fondaĵo Junulara Gazeto**, kaj doni detalojn pri la metodo ĝiri kontribuantojn al ĝi.

La kaso de la **Fondaĵo Junulara Gazeto** troviĝas ĉe la CO de UEA en Rotterdam (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando). Oni transpagu kontribuantojn laŭ la jenaj manieroj:

1. Al landaj perantoj aŭ ĉefdelegitoj de UEA, kun peto ke ili ĝiru la sumon en la Fondaĵon.
2. Rekte al UEA, kun sama peto.
3. Al landaj sekcioj de TEJO (I. Durwael, Dolfijnstraat, 77, Antwerpen).

Se eble, bonvolu post aperigo sendi ekz-on de ĉiu artikolo pri la Fondaĵo al la Kasisto de TEJO, kiu ankaŭ pretas liveri al vi pliajn informojn laŭbezono, kaj eventuale aranĝi pri la verkado de gazetartikoloj pri la Jaro.

Tre sincere via,
Günther BECKER, Prezidanto
Marek PITRZAK, Ĝenerala Sekretario
Humphrey TONKIN, Kasisto
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

Alvoko de Japanujo antaŭ la 18a Olimpiko en Tokio LERNU KAJ PAROLU ESPERANTON!

Kiel vi bone scias, la 18a Olimpiko havos lokon en Tokio en la jara 1964. Tiam multaj homoj el la tuta mondo vizitos Japanujon, kaj ni japanaj esperantistoj forte deziras trovi inter ili multajn esperantistojn.

Ni varme akceptos ilin kaj povos havigi por ili ŝancon viziti diversajn vidindaĵojn aŭ prizorgi pri ilia travivado.

Estas tre feliĉe al ni se vi transdonos nian deziron al la koncernanta aŭtoritatularo en via lando konsilante praktikadon de internacia lingvo Esperanto.

Ne forgesu ke via favora agado pri ĉi tiu afero povus kaŭzi enkondukon de Esperanto kiel unu el la oficialaj lingvoj en estontaj Olimpikoj.

Laŭ la decido de la 48a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, reprezentante la kongresanojn ni subskribas.

**La prezidantaro de la
48a Kongreso de Japanaj Esperantistoj.**

Cu ESPERANTO gajnos « oron » ĉe la OLIMPIADO en Tokyo 1964

La Dana Radio raportis pri la tre grandaj lingvaj malfacilaĵoj, kiujn renkontos la sportistoj kaj turistoj, kiuj vizitos Japanujon Jen mia propono :

1. La Esperanto-organizaĵoj en Japanujo kaj la japanaj samideanoj komencas kiel eble plej baldaŭ instruadon al miloj da « lingvaj helpantoj », kiuj volas kaj povos ĉeesti ĉe la Olimpiko. Ankaŭ la japanajn sportistojn oni devas same aktivigi.
2. La naciaj Esperanto-organizaĵoj kontaktas kun la Naciaj Komitatoj de la Olimpiko por konvinki ilin, ke la plej rapida kaj rekta vojo antaŭen estas la « Esperantovojo ». Ili publikigas artikolojn en siaj propraj bultenoj, kaj ili instigas la gazetaron de sia lando publikigi mallongajn kursojn de Esperanto. Kompreneble ankaŭ la naciaj radiostacioj devas — per disaŭdigo pri Esperanto kune kun la ordinara sportaj komunikoj — helpi al forigo de lingva problemo de la Olimpiko.
3. De la Centra Oficejo de U.E.A. en Rotterdam oni petas ĉiujn koncernajn landojn rekomendi al la Universala Komitato de la Olimpiko nepre utiligi Esperanton por solvi la problemon pri interkompreniĝo de la diversaj nacioj dum la Olimpiko.

ORAN PREMION.

J. Stig HANSEN, lernejestro,
Lundtofte, Lyngby, Danmark.

R E CENZUJ

« The International Language Review » eldonas Floyd Hardin P.O. Box 393 DENVER 1, Colorado, U.S.A. Aperas kvaronjare je abonprezo de 2.50 Us. Dol. Po ekzemplero : 0.65 Us. Dol.

Tiu-ĉi stencilita revuo enhavas artikolojn en la Angla lingvo kaj en pluraj internaciaj lingvoj. Tiu kiu bone konas esperanton, povas kompreni la artikolojn en la aliaj lingvoj. Ĝi estas destinita al ĉiuj kiuj okupas sin pri la problemoj de la mondlingvo ĝenerale kaj pri la ekzistantaj projektoj speciale. Tiu-ĉi numero prezentas artikolon pri la bazaj principoj de nova mondlingvo, Utilo (ankoraŭ !). Poste sekvas artikolo pri la « plej simpla universala helplingvo : BABM' (!). Kaj artikolo pri la ŝanĝo al la angla ortografio. Kaj poste la granda, peza peco : simpozio de opinioj pri la demando ĉu esperanto estas la respondo al la mondlingva problemoj. Vi konstatare ke la simpozioj venas en la modo ! En tiu parto estas repesita la kritika artikolo de Prof. Lapenna pri la verko de P. Burney en la kolekto « Que sais je ? » : Les Langues Internationales », pri kiu aperis recenzo ankaŭ en nia revuo. Al tiu akra kritiko de nia sekretario de UEA respondas ne malpli akre Jens Carstensen el Danujo en Interlingue-Occidental, kun traduko en la Angla; kaj A. Matejka el Svisujo. Defendas la tezon de Dr. Lapenna : David Richardson, prez. de ELNA, E. James Liebermam kaj Montagu Butler. Ni bedauros ke la numero estas pli polemika ol scienc-informa. Jam longe kontraŭpruvitajn aŭ pure teoriajn argumentojn ni relegas en ĝi. Iu Dr. Ottmar Loew el Usono preferas ankoraŭ naciajn lingvojn, sed, ĉar li efektive timas lingvo-imperialismon de la Angla, li proponas la Hispanan. Tiel vi vidas ke inter tiuj kiuj ne volas neŭtralan lingvon, regas kaoso rilate al la elektenda nacia lingvo. Iu W.M. Gellhaus de la universitato de Hamburg pledas por ke la antagonistoj sur tiu-ĉi tereno restu tamen amikoj. Kaj, efektive, per tio mi volas ankaŭ fini. Mi ŝatus rekomendi la revuon je unu kondiĉo : ke ĝi iĝu malpli polemika revuo, kaj pli interakordiĝtereno kie la anoj de la diversaj sistemoj aŭskultu (vere aŭskultu) unu la alian, komuniku siajn spertojn kaj pozitive konstruu per sciencaj artikoloj.

Drs. F. Roose.

Ivan St. Georgiev : « Provo alfronti la vivon » Poemaro. Antaŭparolo de W. Auld. Eldonis « Stafeto » en la serio de la « Beletraj Kajeroj » en La Laguna sur la Kanariaj Insuloj, en 1963. 112 paĝoj. Prezo : 1 Us. Dol.

La enkonduko diras ke niaj poetoj provis alfronti la grandajn problemojn : naciismo, paco, milito, ŝtatpotenco, homaj rajtoj k.s. sed ne mencias la seksecon ! kiu laŭ mi, tamen troviĝas ĉe niaj poetoj pli ol « bonaparte » (dankon R. Schwartz !). En alia parto tiu antaŭparolo trovas eble kontraŭdiron, nome kie Auld diras (p. 11) ke « en la moderna mondo ni trovas disvastigon de du specoj de poezio : poezio tre intelekta, kaj poezio propagande simpla kaj ...sensuka. (!) Mi tute kaj tute ne akordiĝas ! Ĉu ekzistas io pli simpla ol la kanto kaj poemo « Sankta Nokto, paca nokto » kaj samtempe plibela, artbela ? Ni, Flandroj pensu pri la poezio de Alice Nahon. Simpla, kaj kiom belega ! Ĉu « La Kapelo » de Uhland, kium tradukis Zamenhof estas sensuka ? ! Tiu-ĉi juna (?) Bulgaro ne prikantas (ne devas ?) la materian progreson de sia lando ; temo kiu al multaj donis novan vivcelon kaj idealon. Li poemas pri sia individua kazo. Kaj... li ne trovas celon en la vivo. Eceptfoje li sentas senton de feliĉo ĉe io bela. Foje animas lin tre malpreciza sento, aŭ revo pri iu venonta feliĉa stato (p. 61-62). La 27a kanto sur p. 25 enhavas verdire tre malmulte da poezio. Tiel ke oni ekhavas la impreson ke la poemaro « donas iom malmulte ». Sed sur aliaj paĝoj estas kelkaj tre belaj poemoj. Admiru ekzemple sur p. 47, 82 kaj 89 la aliteraciojn. Tre amara estas sur p. 82 la poemo « Vino ». Amatoroj de simpla, bone

komprenbla, tamen bela poezio aĉetu la verkon. Ĝi estas ankaŭ propagando por nia kulturo ; kaj bona laborilo por niaj grupvesperoj. Mi volas fini per du rimarkoj. Leganto bezonas ne nur la Plenan Vortaron sed ankaŭ ĝian suplementon. Due, Eldonantoj de poemoj devus klopodi por ekscii (kaj ankaŭ presigi) la daton de ĉiu poemo. Mi scias ke tio tre ofte ne eblas. Estas tamen necese se oni volas sekvi la internan evoluon de poeto.

Drs. F. Roose.

Henri Baupierre : « Specimene » Parodioj kaj pastiĉoj. Eldonis « Stafeto » en la serio de la « Beletraj Kajeroj » en La Laguna sur la Kanariaj Insuloj ; 1962. 138 paĝoj. Prezo : 1.50 Us. Dol.

Mi forte dubas ĉu la verkinto estas tiel nova esperantisto kiel li komprenigas en la « Pro...logo... ». Tiu-ĉi rimarkinda kaj tute eksterordinara verketo prezentas 47 imitojn de 41 esperanto-verkistoj. Inter la parodie prezentitaj aŭtoroj troviĝas pluraj malnovaj kiel Emba, Engholm, Lanti, Cart k.a. ne nur el tiu fakto, sed ankaŭ ĉar la imitaĵoj plejparte estas tre bone sukcesintaj, mi konkludas unue ke Baupierre funde konas nian literaturon kaj, due, ke li preskaŭ certe ne estas tia novbakita esperantisto kiel kelkaj « diras ». Cetere, lian unuan kontribuadon al « La Nica Literatura Revuo » mi trovis por la jaro 1959 ; kaj tie li pravas ke li majstras la espranto-lingvon kaj la rakontoarton. Pro la amplekso de la literaturajoj tie-ĉi parodiitaj, mi opinias ke nur malmultaj samideanoj — ne konante ĉion kio aperis en esperanto — povos plene ĝui la verketon, kiel cetere nur malmultaj kapablus komplete recenzi. Inter tiuj troviĝas mi mem.

Fakte ne ĉiuj pecoj estas parodioj. Ekz. « Ne-te-tempa Babilo » estas ironia poemo pri Teo Jung okaze de la batalo -ita -ata. Admiru la vortludon kiu ebligas kompreni « nete tempa » kaj « ne te-tempa ». Tute en la fino de la verko la -atistoj ricevas ankoraŭ pugnobaton en la vizaĝo !... kiu tamen ridigas ! Kelkaj tie nomataj pastiĉoj donas aŭ la tendencon aŭ la animstaton de iu verkinto. Ekz : la poezi-libro de Eli Urbanova « Nur tri kolorojn » (kiujn ŝi poste sciigas esti : griza, malhelgriza kaj nigra) estas aliformita en la titolo de poemo : Nur tri dolorojn. Tre bona imito de « Sonĝe sub pomarbo » de J. Baghy, estas « Ronĝe sub pomarbo ». Vole nevole ni devas admiri la virtuozecon kaj de Baghy kaj de Baupierre. Imitaĵo kiun mi nomas preskaŭ majstra estas la « Infona Roso » laŭ W. Auld. En kelkaj kazoj tamen estas malfacile diri ĉu la pastiĉo sukcesis ; nur la aŭtoro mem kapablus diri tion. Mi opinias ekz. la « Balado » laŭ K. Kalocsay sufiĉe bona poemo ; sed ĉu ĝi vere tre fidele montras la spiriton de Kalocsay ? Tion K. mem devus atesti. Estis preskaŭ antaŭvideble ke troviĝas ankaŭ poemo pri « mia kato » laŭ M. Boulton. En ne malmultaj pecoj Baupierre pravas ke li estas vera majstro en tiu arto de la pastiĉo ; ekz. en « Miraklo » laŭ la sama M. Boulton. De kelkaj poemoj mi demandis al mi kia! B. ĝuste al tiu verkisto ĝin atribuis kaj ne al alia. Tio estas la kazo kun « Mi kaj Li » atribuita al P. Thorsen. Aŭ devus esti ke B. vere tre bone kaj profunde konas Thorsen. kaj la aliajn !.. li kiu estas nova esperantisto ?! En la « ŝtopoj sen nomo » li bone imitas la nekomprenblecon de multaj poemoj de B. Ragnarsson (kies poemaro havas titolon : Stupoj sen nomo). La ŝanĝo de la titolo sugestas multe ! Kaj kia imagpovo ! Ne eblas en la mallarĝa kadro de recenzo ĉion preparoli. Ankaŭ, mi ne kompetentas pri ĉiuj verkistoj. Ni aldonu nur ke i.a. estas parodiitaj aŭ imititaj aŭ priskribitaj ankoraŭ Azorin, de Beaufront, Carlsson, De Kock, Dresen H., Forge, Lapenna, J. Regulo Perez, R. Schüartz, Luyken, Szilagyi, Tarkony, Waringhien k.a. Do, tre riĉa kolekto.

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo” (Sro Iserentant R.)
Kerklaan 61 Brugge, P.K. 152140.

Mi devas tamen fini per tre malagrabra noto. Estas nekontesteble ke en la esperanto-literaturo abundas la temo sekseco. La verkantoj kaj eldonantoj tamen observu ke ne ĉiuj esperantistoj estas sekse malsanaj aŭ sekse obseditaj homoj. Tiu konstanta ripetado de la samo fine enuigos. Notu ke ni havas tiurilate jam la unuajn kontraŭaĝojn. La artikolo de Uwe Joachim Moritz en la « Germana Esperanto-Revuo » (junio '62 ; la sprita kaj ironie poemo « Sceno en

redaktejo » en « La Praktiko » dec. '62 ; kaj la rekta atako kontraŭ « Specimene » en « The British Esperantist » de januaro 1963. Tiu-ĉi averto ne direktiĝu al la poetoj ; ĉar, kiel diras Flandra proverbo : barelo povas doni nur tion kion ĝi enhavas. Sed niaj eldonantoj atentu ! Eble kelkaj svingos nun tableton kun la vorto prudeco. Ne ! Ekzistas diferenco inter la maniero laŭ kiu ekz. W. Auld kaj M. Boulton pritraktas la seksan problemon aŭ fenomenon kaj inter pornografio. (kvankam kelkfoje la du cititaj aŭtoroj tre danĝere alproksimigas.) Nu, modelon (mi prekaŭ dirus klasikan) de pornografio mi trovis sur paĝo 50, tiel prezentita : el la notlibro de K.R.C. Sturmer. Tion la eldoninto ne povis allasi. Ĝi estas makulo sur la verko. Mi scias la danĝeron de propagando (pro scivolemo !) atentigante pri tio. Sed mi tamen ne povis preterlasi sen protesto. Estus kvazaŭ ni ĉion allasus kaj aprobus. Kaj nun la konkludo : ĉu rekomendi la verkon aŭ ne ? La konkludon vi mem faros, kara leganto. Mi konstatas ke ĝi enhavas lingvan virtuozecon, foje eĉ majstran pritrakton de la pastiĉo aŭ priskribo. Kaj multloke vi certe ĝuos la puran poezion aŭ artan prozon. Sed ĝi enhavas ankaŭ tion kio ŝokis min kaj sendube ŝokos multajn inter vi.

Drs. F. Roose.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE

S. P. R. L.

Tel n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabeloj ; KATOKULO, por signalvitroj.

La Urbkonsilantaro de Anderlecht decidis, la 4an de novembro 60, laŭ propono de Samideano Jos. Bracops, urbestro kaj parlamentano, nomi novkreatan vojon,

AVENUE DOKTORO ZAMENHOF.

Ĝi nun estas sufiĉe preta kaj estos inaŭgurata, sabaton, 15an de junio 63.

Solena ceremonio okazos en la urbdomo kaj poste, grupe, oni marŝos ĝis la nova avenuo kie la urbestro tranĉos la tradician kordonon.

Simpatiantoj danku kaj gratulu la urbestraron. Antaŭdankon.

SAT-Amikara Grupo Bruselo,
Sekretario : M. Van Aelst.

oni petas nin sciigi :

Esperantistoj en JIHLAVA, Ĉeĥoslovakio, serĉas korespondamikojn. Precipe por 50 komencantoj ni bezonas multajn adresojn de ĉiuj landoj. Ĉiujare ni perdas interesantojn, ĉar mankas al ili ebleco elprovi post fino de la kurso, kion ili ellernis. Helpu al nu cviti tion kaj skribu tuj al Esperanto-grupo ĉe Domo de Kulturo, JIHLAVA, Ĉeĥoslovakio.

La ĉi jara internacia kongreso de K.E.L.I. okazos en GRAZ, AUSTRUJO, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. Survoje al la U.K. en Sofio (Bulgario), vi povas halti dum unu semajno en la bela Aŭstrujo. Niaj kongresoj jam havas bonam reputacion pro la bona, hejmeca sfero, kiu regas tie. La programo estas parte studa, parte distra. Ankaŭ el turisma vidpunkto oni povas multe ĝui.

La kotizo por partopreno de la kongreso kun restado, manĝado, tranoktado kaj unu tuttaga ekskurso sumiĝas nur 570 aŭstrajn ŝilingojn. Studentoj kaj lernantoj sen propraj enspezoj havos speciale favoran kotizon.

Informojn donos al vi :

F-ino Tini Putto

Bennekomsseweg 20

EDE (Gld.) NEDERLANDO.

UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO

Sofio - Bulgarujo

3.8 - 11.8.1963

kotizoj

Kategorio	ĝis 31.3.63	post 31.3.63
Kongresano	644	728
Edz(in)o	322	364
Junul(in)o ĝis 20j.	406	462
Studentoj(20j ĝis 30j.)	238	280
Blindulo & gvidanto	322	364

Individuaj membroj de Universala Esperanto asocio pagas la jenajn sumojn :

Kongresan(in)o	574	658
Edz(in)o	287	329

Pagu al S-ino Plyson, Bruselo, P.K. 2368 04

KARAVANO AL LA SUNO

Post la publikigo de la tuta vojaĝplano ni ellaboras detale nian tempo-uzadon. Intertempe necesas fari la paŝojn por akiri ĝustatempe la vizojn (5 landoj x 2 semajnoj = 10 semajnoj).

Ni intertraktis kun la diversaj agentejoj de tiuj landoj (Cedok, Ibusz, Balkan-touriste, Karpati) kaj la rezulto estas ke mi povas koncentrigi ĉion. Por Ĉeĥoslovakujo ni eĉ povos ricevi komunan vizon.

Mi publikigis en la lasta numero de « Sonorilo » la liston de 18 kunvojaĝantoj, kaj mi nun povas kunmeti la tutan liston :


1. & 2. S-inoj Plyson (Bruselo) — 3. F-ino Chris. Lefevere (Brugge) — 4. F-ino J. Terryn (Gent) — 5. & 6. Ges. Deboes. (Gent) — 7. & 8. F-inoj Mention kaj Chaineux (Verviers) — 9. F-ino Deketelaere (Blankenberge) — 10. & 11. Ges. Curnelle (Francujo) — 12. F-ino Kestens (Bruselo) — 13. F-ino Begodt (Merelbeke) — 14. F-ino Enzlin' (Antwerpen) — 15. Sro F. Roose (Brugge) — 16., 17. & 18. Ges ; Ockey kaj filino (Banstead, Anglujo) — 19. S-ino Arnold (Bruselo) — 20. F-ino Bettmann (Parizo) — Sro Volders F. (Antwerpen) — 22. & 23. Ges. Saunders (Anglujo) — 24. Sro Demol M. (Brugge) — 25. Sro S. Saft (Anglujo) — 26. Sro H. Harrison (Anglujo) — 27. F-ino Verbeke (Francujo) — 28. Sro I. Durwael (Antwerpen) — 29. F-ino Opsomer (Bruselo) — 30. F-ino Orsolini (Charleroi) kaj mi mem, entute 31.

Restas en nia aŭtobuso tri liberaj lokoj tute malantaŭe, por la valizoj, ripozo k.t. p. Se do neniu el la enskribintoj forŝalas, ni ne plu povas akcepti novajn. Mi aldonu ke por la irvojo, tri enskribintoj ne kuniras, nome Sroj Demol, Harrison kaj S. Saft. Ili nur ek de Sofio kunveturas ; do por la iro restos 6 lokoj ne okupitaj. Ek de nun ĉiuj komunikoj estos sendataj nur al la kunvojaĝantoj pere de cirkuleroj aŭ leteroj. MAERTENS, G.

LASTA SCIIGO : FORFALIS GES. DEBOES

ANSTATAŬ IGATAJ PER F-ino BERNAERTS(LIER) &

F-ino CHAMPY (LIEĜO)



DIFINOJ :

Horizontale :

- 1859 + 1917
- ĉevalrajdisto - numeralo
- franca mallongilo por Organizo de Unuiĝintaj Nacioj - vesto ĉirkaŭ la tralio.
- ne pli ol - interneN
- vaporo (en greka) - numeralo sufikso.
- denove - sur telegramoj : respondo pagita - plej riĉa kron'
- ĵeti eksteren - per utiligo.
- resenda pronomo - besta haŭto - sufikso.
- numerala sufikso - enloĝanto de Nord-Afrika urbo.
- sur la kovrilo de via revuo.

KRUCVORTENIGMO n° 4

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	█									
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

Vertikale :

- plej bona okazo por lerni E. interparoladon.
 - interjekcio - kurba fermita lini'.
 - provizita per ornamaj truetoj.
 - nomo de litero - koloroN de ludkartoj.
 - nur unu estas sendata al ĉiu abonanto.
 - malofta gaso - kolekt' de instrumentoj.
 - ne trompem' - persona pronomo.
 - frakci' - certa persono - prepozicio neniam sekvata de akuzativo.
 - nomo de litero - enloĝanto de verda loko en dezerto.
 - akiro aŭ havo de ĝusta ideo.
- N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.

- 2) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
- 3) Sendu vian solvon al: Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

NEPRE ENSENDU VIAN SOLVON, SE NE, KIEL VI VOLAS KE NI SCIU ĈU TIU ĈI RUBRIKO INTERESAS VIN ?

SOLVO DE LA PROBLEMO N° 3

- S A M I D E A N A
- A M O - O K R O -
U N I V E R S O - F
N E N I O M - R I O
U - D - S - K U I R
E T U L I N E T - T
C I L I N D R O - E
O F I C O - U - B C
- O N - - A B O C O
- - - D O N A S - N

La vortoj ĉe la kvar lateroj formas la devizon:
SAMIDEANA UNUECO DONAS FORTECON.

Inter la diversaj ensendaĵoj, kvin seneraraj de: S-ro. J. Eneman, Bruĝo; S-ino. J. De Hondt, Antverpeno, F-ino. M. Willems, Bruĝo, S-ro. R. Iserentant, Bruĝo kaj F-ino. El. De Coene, Ekeren. Lotumado aljuĝis la libropremion al S-ino. J. De Hondt.

Universala Esperanto-Asocio Kandidato Por la nobel-Pacpremio 1963
Oslo, marto 1963.

Pluraj ministroj, deputitoj de naciaj parlamentoj, konataj filozofoj, historiistoj, profesoroj de Internacia Juro aŭ Politikaj Sciencoj kaj aliaj elstaraj personoj el 13 landoj faris proponon al la Nobel-Komitato en Oslo, ke Universala Esperanto-Asocio, la organizaĵo reprezentanta la tutmondan movadon por komuna Internacia Lingvo, kiu atingis rimarkindajn rezultojn por proksimigo de la popoloj kaj la monda paco, ricevu la Nobel-Premion por la Paco por la jaro 1963.

Inter la proponintoj troviĝas la nomoj de S-ro Vigo Kampmann, Cefministro de Danlando; S-ro Guy Mollet, Deputito kaj estinta Cefministro de Francujo; S-ro Thanopoulos Dimitrios, estinta Ministro kaj nun unua Vicprezidanto de la Helena Parlamento; Adv. Virginio Bertinelli, Ministro de Laboro en la Itala Registaro; Prof. D-ro Tadeuze Kotarbinski, estinta Prezidanto de la Pola Akademio de Sciencoj; Prof. Oscar Secco Ellauri, estinta Ministro de Publika Instruado kaj Ministro de Eksterlandaj Aferoj en la Urugvaja Registaro; S-ro Aase Bjerkholt, Membro de la Norvega Registaro; S-ro Franz Jonas, Deputito kaj Urbestro de Wien; pluraj membroj de la Franca Senato; 11 deputitoj kaj senatanoj de Italujo; 14 membroj de la Nederlanda Parlamento; deputitoj de la parlamentoj de Cejlono, Madagaskaro kaj Urugvajo, profesoroj kaj filozofoj el Hispanujo, Italujo, Japanujo, Pollando kaj Urugvajo.

La proponoj akcentas la kreskantan disvastiĝon de la Internacia Lingvo en la lastaj jaroj ĉie tra la mondo; la gravecon de la abunda traduka literaturo en la Internacia Lingvo kaj el la Internacia Lingvo en la naciajn idiomojn, kio multe helpis al reciproka aprezado de la kulturaj valoroj de ĉiuj popoloj; la kunligan rolon de la multnombraj gazetoj, sciencaj kaj literaturaĵoj, kiuj aperas en Esperanto; la radio-elsendojn en la Internacia Lingvo; diversajn artajn manifestaciojn en Esperanto aŭ pere de ĝi; la sciencajn literaturon kaj la sciencajn rilatojn trans la lingvaj baroj. En la proponoj estas donitaj enkaŭ multaj informoj pri la agado de la Universala Esperanto-Asocio, speciale pri tiu agado, kiu rekte koncernas la mondan pacon.

En la nuntempaj kondiĉoj, kiam de tago al tago ĉiam pli akriĝas la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, la solvo kiun prezentas la Internacia Lingvo Esperanto ĉiam pli altrudiĝas, kaj ne estas surprize ke tiom da elstaraj nomoj sur la kampoj de politiko, sciencoj kaj filozofio kandidatis Universalan Esperanto-Asociacion por la Nobel-Pacpremio en la jaro 1963.

Niaj informaj centroj ĉe Grafo de Cuyper kaj G. Maertens sendis tiun informan al tre multaj gazetoj kaj revuoj. Se vi legas ĝin ie, bonvolu sendi la eltranĉaĵo mervianta la gazeton aŭ revuon en kiu la teksto aperis. Dankan.

GRUPA VIVADO

nekrologoj

GEORGES VAN DEN BOSSCHE

Kvankam li, jam de multaj monatoj, kuŝis en kliniko, la subita ekscio pri lia morto forte emociis ĉiujn en la movado, kiuj konis Georges Van den Bossche.

Kaj kiu lin ne konis? Veninta al ni tutjuna, li plene kunvivis, ekde 1929, la vivon de la antverpena grupo « La Verda Stelo ».

Kiam, post la morto de S-ro Schoofs, en 1934, Belga Esperanto-Instituto decidis malfermi esperanto-magazenon en la Willemsstraat, la juna geedziga paro Vanden Bossche-Van Eynde, ekenloĝis en la domon kaj fleĝis la vendadon. Tion ambaŭ daŭrigis kiam okazis la translokigo al la Lange Leemstraat, kie la magazeno restis malfermita dum la tuta milto kaj ĝis en la jaro 1947.

Intertempe, Georges Van den Bossche estis ekludinta rolon sur alia kampo: Dum pluraj kaj kelkfoje malfacilaj jaroj, li estis ĉefdelegito de U.E.A. kaj plenumis tiun funkcion ĝis kiam ambaŭ Ligoj decidis iĝi mem la perantoj de U.E.A. en nia lando. Tiam li ekdediĝis sin plene al la direktado de Belga Esperanto-Instituto, kies vera gvidanto li estis ĝis kiam li, antaŭ du jaroj, ne plu kapablis daŭrigi sian taskon.

Kiam li lin vizitis, li tamen ankoraŭ regule faris demandojn pri la funkciado de la libro-vendado kaj ni kredis ke estis dolĉa al lia koro la ekscio pri la kunfandiĝo de la du libroservoj en unu nova societo.

Ĉiuj esperantistoj en Belgujo konservos pri tiu administranto de RBLE kaj kunlaborinto sur diversaj terenoj ne nur plej bonan, plej dankeman, sed ankaŭ plej amikan memoron.

Ni prezentas al lia edzino, al liaj du filinoj, membrinoj de nia Federacio al liaj gefratoj, kiuj ankaŭ ĉiuj iam apartenis al nia movado, kaj al la tuta familio, niajn plej sincerajn kondolencojn.

GERARD DE BOES

Dum la tago kiam ni memoris la morton de Kristo, mortis ankaŭ tiu vera Kristano en sia 67a jaraĝo. Naskiĝinta en St. Niklaas, li longtempe loĝis en Ronse, kaj tie, sur la batalfronto, defendis nian kulturon. Idealisto en la vera kaj plena senco de la vorto, li plifortigis niajn rangojn en la « heroa » epoko antaŭmilita, kaj estis unu de la pioniroj de la « Flandra Ligo ». Sed ne nur la Ligo, ja la tuta esperanto-movado ŝuldas tre multe al li. Lia propaganda fervoro — racia kaj konvinke — etendiĝis ĉie kaj ĉe ĉiuj. Li ankaŭ subtenis kaj abonis kaj aĉetis multajn publikigaĵojn. Liaj lastaj vivmonatoj estis dolorplenaj kaj lia revo, kunveturi al la kongreso de Sofia, ne povas plenumiĝi. Kvankam jam de longe malsana, lia morto tamen venis subite kaj ne-atendite. La enterigon, la 17an de aprilo, ĉeestis gesamideanoj el Gent, Antwerpen, Kortrijk kaj Brugge.

La memoro pri li plifortigas nin!

unua ekspozicio en la
ANTWERPENO AGLOMERACIO

Kiel niaj legantoj jam scias, la Antverpena Grupo « La Verda Stelo » disponigas al la grupoj de nia Federacio, belegan, modernan ekspozician materialon, kunmetitan plej grandparte de du niaj estraranoj, S-roj J. Verstraeten kaj Fr. Schellekens.

La Antverpena E.K.I. (Esperanto-Ko-

mitato Intergrupa) en kiu kunestas « La Verda Stelo », « Rekta Vojo », la Naturamikoj kaj la laboristoj decidis, antaŭ nelonge, organizi en Grand-Antverpeno grandskalan propagandon, larĝe uzante tiun riĉan ekspozician materialon.

Dank'al la kunlaboro de la administracio de Deurne, unua ekspozicio povis okazi sabaton, la 23an kaj dimanĉon, la 24an de marto, en « Studio Cogels » dependaĵo de la malnova urbdomo. Dua



Ĝenerala vidaĵo de la ekspozicio.

estas jam antaŭvidita por la monato de majo, en Hoboken, kaj tria okazos la 15an kaj 6an de junio en Borgerhout, kies urbestro jam skribe donis sian konsenton pri disponigo de la bela fest-salono de la Turnhoutse baan.

En ĉesto de kvardeko da samideanoj, S-ro M. Jaumotte, prezidanto de EKI, bonvenigis la Urbestron, S-ron De Queecker, kaj ties sekretariojn, kaj dankis la skabenaron, ĉar ĝi metis tiun agrablan kaj modernan salondon je dispono de la Komitato. Post aŭdigo de sonbendo dekminta, kiu permesis montri diapozitivan materialon rilate al nia lingvo kaj movado, li petis la urbestron oficiale malfermi la Ekspozicion.

La Urbestro gratulis la organizintojn kaj ĉiujn tiujn, kiuj, malgraŭ la indiferecenteco de parto de la publiko kaj de multaj oficialuloj, daŭrigas senĉese sian propagandon. Aludante la fakton, ke ĉiu eksidas nun en aŭtomobilon kaj forvojaĝas al foraj landoj, li substrekkis la utilecon kaj neceson de internacia lingvo. Li deziris al nia movado plej bonan sukceson kaj malfermis la Ekspozicion, kiun li tiam detale vizitis.

Tiun solenan malfermon ĉestis multaj gvidantoj de nia movado: S-ro H. Sielens, honora vicprezidanto de BEF; S-ro Van Gulck, prezidanto de la Skolta Esperanto-Ligo, la estraranoj de la kunorganizintaj grupoj kaj multaj aliaj.

Tuj post la malfermo alvenis aŭtoĉaro kun lernantoj de la Mezgrada Lernejo de Wilsle, apud Wijchmaal kaj Loveno, gviditaj de klasinstruistino kaj de la profesorino de Esperanto en tiu lernejo: F-ino Van Meensel.

Inter la vizitantoj dum la du tagoj,

estis i.a. F-ino Orsolini, nia administrantino el Charleroi kaj multaj malnovaj esperantistoj, inter kiu eĉ unu, S-ro Caris, kiu partoprenis la 7an Universalan Kongreson en Antverpeno kaj ankoraŭ rekonis, sur fotografiaĵo kun D-ro Zamenhof, la tiaman prezidanton de Belga Ligo kaj prezidanton de la Kongreso.

La organizintoj povas esti fieraj kaj estas efektive feliĉaj pro la akirita sukceso, kiu certe iros ankoraŭ pliampliksiĝante, dum la proksimaj monatoj, en Hoboken kaj Borgerhout.

Plej korajn gratulojn, ni ankoraŭ aldonas por la du amikoj, kiuj dum tiu ĉi malvarmega vintro pasigis en garaĝo tri kaj kvar vesperojn en la semajno, por ĝustatempe finpretigi la vidindan kaj admirindan materialon! Hip! Hip!
S.



S-ro De Queecker, urbestro de Deurne, dum la malferma parolado de la ekspozicio.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »

Poŝtĉeknumero: 726.54

Dimanĉon, la 16an de decembro posttagmeze en « Witte Leeuw » okazis la Kristnaska Infanfesteto. Bele ornamita salono — multaj infanoj — festa atmosfero! La Prez. S-ro M. Jaumotte bonhumore bonvenigis la infanojn kaj gepatrojn. Ges-roj H. De Roover, kunaj, mirinde prizorgis kaj prezentis manpup-teatraĵojn ege ŝatatajn kaj aplaudatajn de la infanoj. Diversaj el ili dum la paŭzo kantis aŭ deklamis kaj ĉio estis konkludata ĉe tablo kun kukoj kaj ĉokolada lakto. Finfine belaj donacoj estis disdonataj de « Paĉjo Kristnaska » (S-ro F. Schellekens), — donacoj havigitaj de la grupo kaj flegitaj de S-inoj Marg. Jaumotte, Nath. Balleux kaj F-ino Hort. Brack.

La 21an Kristnaska atmosfero estis kreata de S-ro F. Schellekens pere de lumbildoj kaj diapozitivoj. F-ino Enzlin per fotoj kaj S-ro L. De Marré per prelego pri Kristnaskaj kutimoj en aliaj landoj kompletigis la programon.

La 28an pro la vintra kaj frosta vetero malmultaj gemembroj ĉestis la parolatan ĵurnalon.

La 4an de januaro, por bone enkonduki la novan jaron, S-ro G. Debacker faris paroladon pri « Mia Vojaĝo al Montafan en Aŭstrujo ». Per diapozitivoj kaj abunda komentario la paroladisto sukcesis kapti la aŭdantaron en la fean montaran sferon kie li ne nur faris esplorajn ekskursojn, sed ankaŭ priatentis bestojn kaj plantojn. Varmaj dankvortoj de la Prez. kaj tondra aplaŭdo de la publiko ankoraŭ longe sonoros en la oreloj de la paroladisto.

La 11an dum la ĝenerala jarkunsido

la sekretario legis sian raporton pri la forpasinta jaro dum S-ro M. Jaumotte konigis la finanĉan situation (pro mal-sano la kasisto S-ro R. Balleux malĉestis) kiu estas favora. Pro 35-jara fidela membreco S-roj H. Boffejon, R. Jaumotte kaj G. Van den Bossche ricevis el la manoj de la Prez. oran steleton sur la rubando de sia medalo. Ricevis bronzan medalon pro 10-jara membreco: S-ino J. Vanderschueren, S-ro G. Vanderschueren, S-ino R. Torremans, S-ino P. Sette-Debacker, F-inoj Marit kaj Herlinde Montmirail. Ricevis la arĝentan medalon pro merito: S-ro H. De Roover.

Dimanĉon, la 13an posttagmeze en la salonoj « Magnus », proksimume 45 verdstelanoj bankedis en festa atmosfero kaj en salono je kies muroj estis prezentata parto de la jus novverkitaj paneloj por Esperanto ekspozicio, grandparte kunmetitaj de S-roj F. Schellekens kaj J. Verstracten. La paneloj vekis viglan admiron. S-ro M. Jaumotte elparolis la bonvenigajn vortojn kaj honorigis 4 malnovajn membrojn de la grupo pro ilia veteraniĝo, t.e. 40-jara fidela membreco. Belaj plaketoj kun gravurita teksto estis transdonataj al S-ino Marg. Jaumotte, S-ino L. Faes, S-ro H. Vermuyten kaj S-ro M. Boeren. S-ro R. Jacobs, nome de la Brusela grupo, per afablaj vortoj transdonis gratulojn kaj salutojn al la ĉestantoj kaj S-ro R. Van Eynde laŭ sprita maniero toastis je la sinjorinoj kaj fraŭlinoj kaj honoris ilin en la persono de S-ino Marg. Jaumotte per transdono de freŝaj floroj. S-ro H. Vermuyten per memverkita kaj tre sprita poeziaĵo abunde amuzis la aŭdantaron. Tombolo kun multaj premioj konkludis la sukcesplenan feston.

HET WELGERENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GERED KLEDING.

KOSTUMEN · SPORTJASSEN · BROEKEN
UNIFORMEN · GABARDIJNEN · LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

La 18-an S-ro F. Schellekens per diversaj teknikaj rimedoj havigis kaj kreis interesplanan «*Reirigardo(n)*» al la jaro 1962.

La 25an dum solena diplomdisdono 4 diplomoj estis disdonataj al la kandidatoj kiuj sukcesis en ekzameno. Estis: F-ino E. De Roover, S-ino Neelemans, S-ro Van Puymbroeck kaj S-ro R. Dedecker. Nome de ili F-ino E. De Roover dankis la profesoron H. De Roover en tre rimarkinda, belstila paroladeto. Belaj libroj estis donacataj al la profesoro kiu, siavice, esprimis sian dankon laŭ amuza kaj sprita maniero. La Prez. S-ro M. Jaumotte konkludis la tuton per bonintencaj konsiloj al la ge-diplomitoj.

London, la 28an komenciĝis nova elementa kurso. 22 gelnantoj enskribiĝis. Gvidas la kurson: S-ro Luc De Marré. La Prez. S-ro M. Jaumotte faris la enkondukan paroladeton.

La 1an de februaro S-ro R. Van Eynde, kiel kutime bone prizorgis la dokumentan filman programon.

La 8an — en la kadro de E.K.I. — oni vizitis la «*Pulĉinela Kelo*» pro kio oni vendis specialan longan/amuzan kaj tipan programon. La prezentado de «*Romeo kaj Julieta*», «*Ursono kaj Valentino*» kaj «*La Leono de Flandrujo*» kreis la karakterizan, folkloran sferon al kiu la 150 ĉeestantoj aldonis laŭvoĉe sian propran komenton dum la tuta evoluo de la teatraĵoj. Menciinda estas ke la «*Pulĉinela Kelo*» — pro ĝia folkloraspekto kaj valoro — nun estas estrata de la «*Muzeo por Folkloro*» de Antverpeno. Post la prezentado la plej granda parto de la ĉeestantoj kunvenis en apuda kafejo kaj «for» trinkis la ĵus spertitajn emociojn dum agrabla babilado.

La 1-5an S-ro A. Faes alportis sian kontribuon al la grupa vivo en formo de parolado kun muziko. Kiel spertulo li parolis pri la vivo kaj verkoj de la finna komponisto Jean Sibelius kaj aŭdigis liajn 2-a Simfonion el 1902 kaj la Koncerton por violonoj el 1903 ludita de Heifetz. Mirinde kiam S-ro Faes malkovras en tiuj noblaj ĉefverkoj por ri-

markigi al la streĉe aŭskultanta publiko. Reago spontanea: korega aplaŭdo post konkludo kortuŝa.

La 22an dum la kultura distra vespero S-ro Roger Jaumotte denove plenis la programon per diversaj amuzaj numeroj al kiuj la ĉeestantoj plentente partoprenis kaj gajnis aŭ ne gajnis la diversajn premiojn.

La 1an de marto dum la parolata ĵurnalo multaj gemembroj kunlaboris: S-ino R. Lecat, S-ro H. Vermuyten, S-ro H. De Roover, S-ro L. De Marré kaj S-ro J. Verstraeten. Sombendo el Hungarujo pri «*La tri Famuloj*» (J. Baghy, M. Bano, K. Kalocsay) kaj kunmetita de la grupo de blinduloj «*Belhor*» el Budapeŝto vekis grandan aplaŭdon kaj viglan komenton inter la membroj. Filmoj memverkitaj de F-ino A. Enzlin pri la Karnaval- kaj florkorsoj ĉe la Lazura Marbordo kaj aliflanke de S-ro J. Montmirail pri Esperanto-ekskurso al Huy konkludis tiun multaspektan programon.

G. FAES

Eiermarkt, 21
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

Programo de la venontaj kunsidoj:
Ĉiuvendrede en «*Witte Leeuw*», Frankrijklei, 4 je la 20.15 h. (1a etaĝo).
MAJO: La 3an: Parolado kun lumbildoj de S-ro Fr. Schellekens pri «*Sud Afriko*»; la 10an: Vespero prizorgata de S-ro H. De Roover; la 17an: Parolado kun lumbildoj de S-ro R. Van Eynde pri «*Alice Nahon* — Vivo kaj Verkaro». Kunlaboras: S-roj L. De Marré kaj H. Vermuyten; la 24an: Promenado tra la urbo gvidata de S-ro Eug. Paesmans; la 31an: Kongres-antaŭpreparoj al la Beneluksa Kongreso.

Nekrologo

Dum la lasta semajno nia grupo estis terure trafita pro la morto de pluraj karaj membroj:

1. D-ro A. Christiaens, fidela membro kaj esperantisto de antaŭ 35 jaroj;
2. S-ro G. Van den Bossche, fidela membro kaj esperantisto de antaŭ 35 jaroj, administrinto-direktoro de Belga Esperanto-Instituto, eksĉefdelegito de UEA;
3. S-ro André Provo, nova membro de antaŭ kelkaj semajnoj nur.

Al la familioj iras niaj sinceraj esprimoj de kondolenco pro forfalo de kara estulo ilia. Ke ili ripozu pace kaj dolĉe.

Filma kaj sombenda rubriko:

La Hungara blindula grupo de Esperanto Belhor el Budapeŝto metis je nia dispono: sombendon de ili verkitan pri «*La tri Famuloj*» (J. Baghy, M. Bano, K. Kalocsay). Ĝi estas senpage akirebla de ĉiuj Belgaj kaj Luksemburgaj grupoj ĉe S-ro J. Verstraeten, St Bernardsesteenweg, 1078, Hoboken. Daŭro: 45 minutoj, 2-traka.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero: 12.30.48)

London, la 28an de januaro okazis la ĝenerala jarkunsido, dum kiu estis reelektita la nova komitato, kiu konsistas el: S-ro R. Jacobs, prezidanto; S-ro G.C. Fighiera, vicprezidanto; S-ro Maurice Nanquette, sekretario; S-ro Jean Oleffe, kasisto; S-ino Elly Staes, arkivistino; S-ro Hector Castel, EKI-delegito; F-ino Simone Opsomer, ekceptantino.

La Fak-komitato konsistas el: S-ro Rob. Vyncke, help-sekretario; S-ino Liljanka De Krom, protokolistino; F-ino Math. Kestens, bibliotekistino; S-ro Piron, teknikisto, kaj S-ro Maur. Daems, flandralingva konsilanto.

La 4an de Junio 1962, nia prezidanto S-ro Jacobs, René starigis vesperon je la memoro de nia grupano F-ino Obozinski, Simone; la 18an S-ro van der Stempel, David gvidis la perfektigan kurson kaj instruis la finaĵojn O kaj U; la 25an okazis sombenda vespero.

La 2an de Julio okazis la parolata ĵurnalo, kies laŭreato estis S-ro van der Stempel, David; la 9an okazis interbald-vespero; la 18an S-ro Oleffe organizis legadon de gaja komedio el la

18 jarcento «*Advokato Patelin*». La diversaj roloj estis interpretataj alterne de S-ro Oleffe, Ge-sroj Jacobs, Kanoniko Gillet, Fino Kestens, Fino Opsomer kaj S-ro van der Stempel David. La ege sprita teksto multe amuzis kaj ridigis la aŭskultantojn; la 23an S-ro Castel vidigis al ni diapozitivojn pri antikvaj hispanaj pentraĵoj. Al tiu nekutima vespero ĉeestis Ge-sroj Mahant kaj ilia filo, el New-Delhi (Hindujo); la 30an diskutvespero, pri la Dormo fare de S-ro van der Stempel, David.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

La 6an de Aŭgusto, parolata ĵurnalo, en la kategorio A S-ro Staes, Elly estis la laŭreato kaj S-ro kanoniko Gillet akiris la plej multe da poĉtoj en la kategorio B; la 13an S-ro kanoniko Gillet priraktis interparoladon pri «*Kiamaniere Legi*»; la 20an Fino Kestens kaj Sino Fighiera, A. raportis pri la 47a U.K. de Kopenhago; la 27an okazis kabareta vespero.

La 3an de Septembro: la parolata ĵurnalo, Sino Fighiera, A. estis la gajnintino; la 10an, parolado fare de S-ro Jacobs, R. la temo estis «*Nia Libertempo en Palma de Majorka*»; la 17an S-ro van der Stempel, D. lernigis perfektigan lecionon; la 24an du kolorigitaj filmoj esperante parolataj «*Vintra Libertempo en Germanujo*» kaj «*Belaj koloroj... bona humoro*» estis prezentitaj de S-ro Piron, Pierre.

La 1an de Oktobro: okazis la kutima parolata ĵurnalo; la laŭreatoj estis en kategorio A, S-ro van der Stempel kaj en kategorio B, Fino Opsomer, S.; la 8an Sino Fighiera, A. faris tre belan kaj interesan parolado pri «*Mia Vojaĝo al Pollando*», ŝi ĝin bonege komentaris kaj vidigis diapozitivojn kaj aŭdigis polajn muzik kaj kantdiskojn; la 15an okazis la perfektiga kurso de S-ro van der Stempel, D.; la 22an S-ro Verstraeten, Jules el Antverpeno faris al ni la honoron prelegi pri «*La Unua Libro Kiun mi legis*»; la 29an Sino Fighiera,

SONORILO, numero de majo-junio, aperos komence de junio; ni akceptas tekstojn ĝis la 20.5.1963.

A. paroladis pri la ega interesa temo «Pollando dum la jaroj 1944-45 kaj 51.

La 5an de Novembro: disdono de la premioj de la parolata jurnalo; la 18an ni ĝoje festis nian jaran festenon, la 19an Sro van der Stempel, D. nin instruis la sufikson (ujo) kaj ankaŭ la rektajn kaj nerektajn asertojn; la 26an okazis prezentado de diapozitivaj pri la esperanta movado.

La 3an de Decembro: parolata jurnalo, Sino Staes, Elly akiris la plej multe da pocntoj per la temo «Naĝarto» kaj Fino Opsomer, Simonne en kategorio B. per la temo «La Kantisto»; la 10an Sro Jaumotte, Maurice, kiel vera spertulo paroladis dum almenaŭ du horoj pri siaj travivaĵoj kiujn li spertis dum sia vojaĝo tra dek landoj; la 17an por gaje fini la jaron, ni festis la «Zamenhofa Vespero».

BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista, Reĝa Societo

(Poŝtĉekonto N° 4835.33)

La 12an de februaro, F-ino Y. Poupeye donis la lastan parton de sia parolado «Tra Eŭropo per diapozitivaj», komentariante belegajn kolorbildojn el Svisujo, Aŭstrujo, Germanujo kaj Nederlando.

La ĝenerala jarkunsido de la grupo okazis la 19an de februaro. Post la kutimaj raportoj: morala, de la prezidanto; pri la grupa vivo, de la sekretariino kaj financa, de la kasisto, la elirinta komitato estis reelektata entute kaj la komitatanoj restas senŝange: Prez.: Sro. Ch. Poupeye; Vicprez.: S-ino S. Verbeke; Vicprez.-Kasisto: Sro D. Demeulenaere; Sekr.: F-ino Is. Van Parys; Bibliotekistino: F-ino M. Willems;

SVISA KALENDARO

Belega kalendaro, formato 34 x 27, kun 12 belaj kolorfotoj de tiu pitoreska lando en la koro de Eŭropo. Sur ĉiu paĝo, dorsflanke de la pejzaĝo prezentita, estas esperantlingvaj klarigoj.

Prezo: sendkostoj enkalkulataj
60,— fr

La kalendaro estos havebla komence de septembro 1963.

Anonceto:

Nejunaj belgaj ĝoedzoj, sed komencantoj, seĉas, por lerni rapide paroli Esperanton, lertan, personon, en Belgujo dezirante helpi ilin.

Por kondiĉoj skribu al:

R. Vyncke

18 Clos du Sippelberg

GANSHOREN

Gekonsilantoj: F-ino Yol. Van Parys kaj Sroj U. Soen, J. Eneman kaj G. Meganck.

La 26an okazis konkurso pri eraraj desegnaĵoj, brile gajnita de Sro Eneman kaj la 5an de marto, F-inoj Is. Van Parys kaj Yv. Poupeye laŭvice paroladis pri la temo «Du tagojn en Romo», samtempe projekciante belegajn kolordiapozitivajn.

Programo por la venontaj kunsidoj

APRILo: 9-an: Kantado kaj deklamado kun magnetofona registrado.

16-an: Rememoroj pri skilibertempo, F-ino Annie Van Eyghen.

23-an: Kiu scias ion? Konkurso, Sro D. Demeulenaere.

30-an: Konkurso pri eraraj desegnaĵoj.

MAJō: 7-an: Debato pri la foira kermeso kaj la procesio.

14-an: Konkursa demandado pri historio, geografio, muziko, k.t.p. F-ino Y. Poupeye.

21-an: Serĉado de eraroj en desegnaĵoj.

28-an: Lastaj arangoj por la Beneluxa Kongreso, Antverpeno, 1-2-3-VI.

KOREKTIGO DE TEKSTO

En la detala raporto pri la belaj jubileaj festoj de la Bruĝa Grupo «Paco kaj Justeco», kelkaj linioj perdiĝis en la presejo.

Citinte ke eksterurbaj simpatiantoj ĉeestis, forfalis tamen la mencio, ke inter ili estis G-roj G.C. Fighiera kaj ke ambaŭ parolis dum la festkunsido en la Urbdomo, li, nome de la Brusela Grupo kaj ŝi, nome de «Heroldo de Esperanto».

Niaj rilatoj kun «Heroldo» kaj kun tiuj du amikoj estas tro bonaj, por ke ni ne reĝustigu kaj plibonigu!



ĴUS APERIS!

La lasta manuskripto de
D-ro Zamenhof

„FABELOJ” de H.C. ANDERSEN
(kvara volumo)

240 paĝoj kun dukolora polvokovrilo

53 originalaj ilustraĵoj de
A. Uniechowski

Preza 150 BF (+ 10 o/o por sendkostoj)

Eldonis: Heroldo de Esperanto
13 rue de la Reinette (Pijpelingstraat)
Bruselo 1

MENDU ĈE LIBRO-SERVO „SONORILO”

aŭ

ĈE „HEROLDO DE ESPERANTO”

manufakturaĵo ĉirno DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
ĝabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

- Antwerpen : Aalmoezenierstr. 2
Abdijstr. 57
Anselmostr. 17
Nationalestr. 87
- Arlon : Marché-aux-Légumes 16
- Brugge : Bredelstr. 8
- Brussel : Galerie d'Ixelles 9
Anspachlaan 194
- Eupen : Kirchstr. 14
- Gent : Brabantdam 25
- Herstal : Rue Large Voie 4
- Leuven : Bondgenotenlaan 29
- Luxembourg : Place de la Gare 67
- Mechelen : Grootbrug 8
- Roeselare : Ooststr. 124
- Tournai : Rue Royale 75
- Turnhout : Herentalstr. 6
- Verviers : Pont St. Laurent 2